
# EKO 2025

**Mesaĝo kun saĝo**

EKO 2025-19. Majo 8. Pezo: Word 40, PDF 400 KB, Sen alkroĉaĵo: Sume 440 KB

## Nova verko el Hungario




Hungaria Esperanto-Asocio eldonis volumon kun eterna, ĉiutaga, malgraŭe instruhava kaj amuza temo pri la historio de la homa stulteco. Ni povas ekscii el ĝi, kiu estis la blua homo en Parizo, kial kuŝis vaksoreĝo sur la katafalko en Versajlo, kiel provis travarmigi sin la frostotrema homo, kiam oni punendis pro amletero, kiuj estis la dungitaj ermitoj, kiuj la ĉampionoj kaj reguloj de drinkado, kiu estis la plej fama murskribaĉisto de la historio, ni povas konatiĝi kun la ne ekzistantaj trunkoj kaj ja tre ekzistantaj ŝosoj de genealogiaj arboj kaj kun multaj ceteraj amuzaj menstordaĵoj kaj strangaĵoj.

István Ráth-Végh: La homa stulteco. Info: judit.schiller@gmail.com:

## Aŭtuna foliaro libera

Mi rekomendas legi la tre interesan intervjuon de Libera Folio kun István Szabolcs pri la kulturperanta rolo de Eo. https://www.liberafolio.org/

## Vortare, hungare

Jam elŝuteblas la lasta versio de EHV Esperanta-hungara vortaro en pdf-formo ĉe vortaro.hu:

https://vortaro.hu/EHV_EO-HU_23-12-05.pdf

La nova versio enhavas korektojn, sugestojn kaj novajn aldonaĵojn, do mi rekomendas elŝuti ĝin kaj anstataŭigi per ĝi la malnovan version.
Ankaŭ ĉi-foje mi kore dankas al ĉiuj kontribuintoj! www.vortaro.hu

Mi rekomendas la telefonan aplikaĵon de ĉi tiu vortaro kaj de HU-EO-vortaro en unu programo! Vidu: https://vortaro.hu/vortaro_ap/index.html

Trimbaŭ eroj senditaj de Jozefo Horvath

## UEA mesaĝis al UN pri streboj al paco

La ĵus forpasinta Papo Francisko estis forta subtenanto de paco, kompreniĝo, homaj rajtoj kaj internacia kunlaboro por la bono de ĉiuj homoj.  Pro tio, UEA pretigis mesaĝon taŭgan por sendo al UN pere de ĝia Ekonomia kaj Socia Konsilio.  Jen la mesaĝo.  Bonvolu cirkuligi ĝin laŭ via bontrovo.  La tekston ni pretigis en tri lingvoj:

Esperanto, angla, franca.  Sentu vin liberaj traduki ĝin ankaŭ en aliajn lingvojn kaj disvastigi ĝin inter esperantistoj kaj en via ekstera laboro por Esperanto.

Nia laboro en UN daŭras, spite la iom krizan situacion, kiun UN nun frontas. La Studogrupo pri Lingvoj kaj UN, en kiu UEA ludas ŝlosilan rolon, okazigos en junio sian kutiman ĉiujaran simpozion (virtualan). Daŭras ankaŭ nia kunlaboro kun CoNGO, la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun UN: UEA nun prezidas la elektokomisionon de CoNGO por prizorgi elekton de nova estraro. Tio okazas parte pro tio, ke UEA devas nun forlasi la estraron de la organizo, en kiu organizo rajtas senpaŭze membri nur dum du deĵoroj. UEA kompletigas tiun sian duan periodon.  UEA partoprenos sian lastan estrarkunsidon, en Ĝenevo, post kelkaj semajnoj.

Humphrey Tonkin

## Retoso tuj okazonta

La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) denove organizas sian retan eventon **Retoson** (kunigo de 'reta' kaj 'etoso')**,** okazontan **de la 9-a ĝis la 12-a de majo 2025**: retoso2025.tejo.org
La evento enhavos koncertojn, atelierojn, prelegojn kaj interagajn programerojn. La programtabulo aperas en la retejo de Retoso.

**Partopreni estas senkosta por ĉiu**. Vi povas aliĝi ĉi tie por aperi en la listo de aliĝintoj kaj ricevi ĉiujn gravajn informojn pri la evento. Alikaze, unuopaj programeroj libere alireblos de la programtabulo. La programtabelon kaj pliajn informojn oni povas ankaŭ trovi en la Eventa servo (eventaservo.org/e/retoso2025).

Oni povas kontribui al la programeroj per ĉi tiu ligilo : mallonge.net/kontribuu-al-retoso2025. Por pliaj informoj, aliĝu la telegramgrupon aŭ retoso.tejo@gmail.com.




TEJO antaŭĝojas pri via ĉeesto! UEA kuraĝigas ĉiujn por subteni TEJO-n: (1) se vi aĝas malpli ol 36 jarojn, aliĝi kiel membro de TEJO (preferinde kiel membro abonanto); (2) se vi aĝas 36 jarojn aŭ pli, aliĝi kiel patrono de TEJO – por (1) kaj (2) uzu la retan aliĝilon – aŭ alternative simple aboni la revuon *Kontakto* per la abonilo (eblas aboni papere aŭ elektronike; abonoj haveblas ekde nur € 6 jare por ekonomie evoluantaj landoj kaj nur € 12 jare por ekonomie evoluintaj landoj).

Sendis Snehaja Vanktesh, Barato

## Katalin Kovats en longviva franca muzeo

"Hodiaŭ ni vizitis la Nacian Esperanto-muzeon en Gray, Francio kaj estis tie tre kore akceptataj kaj ĉiĉeronataj de la filino de la fondinto. Sinjorino Micheline Chateau, direktoro kaj prizorganto kun entuziasmo rakontis pri la riĉega kolekto de sia patro Géo Junier. La muzeo estis fondita kaj inaŭgurita en 1987 en la unua etaĝo de malnova lernejo de la urbeto. La ekspozicio okupas ĉ. 10 salonojn, sur 230 $m^2$, kaj enhavas 8000 erojn, plejparte librojn, sed ankaŭ revuojn, manuskriptojn kaj pliajn"

## Amindaj ondoj el Madagaskaro

Jen la ELSENDO N-ro 151 de Aminda Radio Esperanto kun novaĵoj kaj pri la tribo Betsimisaraka (parto 1) el la oriento de Malagasio. Vi aŭdos la belan voĉon de nia

amikino Lydia, kiu prezentas kun mi la novaĵojn. Mi informas vin, ke la podkasto de Aminda Radio Esperanto baldaŭ ĉesos aperi pro manko de intereso kaj apogo. Eble iu alia Malagaso havos la kuraĝon transpreni la taskon alportante al nia retradio alian novan formon. Mi bondeziras al vi agrablan aŭskultadon! https://youtu.be/QQXozHievTk



## Kursaro en Togolando

La kunvensalono *Beulah-land* gastigis intensivan semajnon de Esperanto-instruado sub mia gvido kun helpo de Kossivi Massan Judith, de la 22-a ĝis la 26-a de aprilo 2025 en Lomeo. La aranĝon organizis Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando APETO kun subteno de UEA. La kursoj daŭris ĉiutage de la oka matene ĝis la unua posttagmeze kun manĝopaŭzo. Deko el la 15 aliĝintoj de la kurso diligente partoprenis ĝin de la komenco ĝis la fino. Kelkaj el tiuj ĉi enskribiĝis en la enretaj kursoj de Françoise Noireau, sed ili ne sukcesas regule sekvi la enretajn lecionojn. Dankon al ĉiuj, kiuj ebligis tiun ĉi ĉeestan kurson.

Adjévi Adjé

## Balkanaj laboroj

La kunsido de la Balkanaj landoj okazis la 26-an de aprilo. Ĝin gvidis Aurora Bute. Partoprenis esperantistoj el Bulgario, Francio, Grekio, Kroatio, Rumanio kaj Serbio.

**Andreas Zervas** prezentis la Eo-kursojn okazantajn en Grekio, per Esperanto12.net, kiun li mem tradukis al la greka lingvo. Aliaj kursoj sekvos, belaj statistikoj kaj promesplena agado por la estonteco. Li prezentis siajn iniciatojn: *Revoj sur la trotuaro* kaj *Lingva laboratorio* (vidu Eventa Servo).

**Aranka Laszlo** rememorigis pri la ILEI-Kongreso okazonta inter la 19-a kaj 26-a de julio 2025 en Beogrado (Serbio) kaj sciigis nin pri la lastaj novaĵoj.

**Radojica Petrovic** sciigis nin pri la iniciatoj de la EEU-sekretario :

La 9-an de majo, la **Tago de Eŭropo,** ĉiuj Esperanto-grupoj, kluboj, rondoj, ktp. ariĝu en publika loko (placo, parko, ks.) kaj **kantu la himnon de Europo en Esperanto.**

**Landaj Asocioj** kunmetu la **agadojn de ĉiuj lokaj grupoj** kaj ilin listigu **laŭ la kalendara sinsekvo**: tiel, ricevinte ĉiujn raportojn, EEU povus ilin **kunredakti kaj prezenti al la oficialaj eŭropaj instancoj**, por montri kiom aktiva kaj socie pozitiva estas la eŭropa esperantistaro

La landaj asocioj ĝisdatigu la **liston de la enlandaj ZEOj** por kampanjo ĉe EU-instancoj okaze de la 140-jara datreveno de Esperanto (en 2027)**.**

**Pierre Dieumegard** parolis pri la balotado en Francio kaj instigis la landajn asociojn starigi asociojn kun la samaj celoj kiel tiuj de EDE.

**Raia Androvska** parolis pri la venonta Aŭstria Esperanto-kongreso en Graz, proponis ke ni sendu salutvortojn al la kongreso. Farota.

**Aurora Bute** prezentis momentojn el la pasintjara UK en Afriko.

Ligilo por elŝuti video-registraĵon de la kunveno estas: https://1fichier.com/?eo6lordv3x5x2vedwvi5

La venonta kunveno okazos sabaton, la 17-an de majo 2025, je la 18-a UTC.

Aurora Bute, estraranino de UEA pri la Eŭropa agado

## Movada Foiro komence de la UK

La Movada Foiro estas grava okazo dum la Universala Kongreso, kiam ĉiuj Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj aliaj movadaj instancoj povas prezenti sian agadon al la kongresanaro. Ĉiu asocio ricevos spacon ĉe tablo, kie ĝi rajtos prezenti siajn afiŝojn, informfoliojn, eldonaĵojn, fotojn de sia agado kaj simile.

**La Movada Foiro en Brno:** sabato, la 26-a de julio. **Ejo:** la kongresejo. **Komencohoro:** 18h30.

- Partopreno en la Movada Foiro estos senpaga.
- Partoprenantoj rajtos vendi siajn proprajn revuojn; ricevi kotizojn, donacojn kaj kontribuojn; kaj akcepti mendojn kaj abonojn.
- Partoprenantoj **ne** rajtos mem vendi librojn kaj aliajn eldonaĵojn (krom revuoj); tiuj povos esti vendataj nur de la kongresa Libroservo. Tamen eblos ekspozicii siajn eldonaĵojn kaj direkti interesatojn al la Libroservo.

## Alta protektanto por BET

**Juozas Olekas**, la unua vicprezidanto de la Litovia parlamento, konsentis esti Alta Protektanto de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj kiuj okazos en julio en la universitato Vytautas la Granda (Kaŭno, Litovio). Legu pli pri Juozas Olekas en “La Ondo de Esperanto” ĉe https://sezonoj.ru/2025/05/bet-191/

## Brno laŭdata en facila lingvaĵo

Aperis nova kaj interesa artikolo en la retejo <uea.facila>, kiun prizorgas Anna Lowenstein. La artikolon verkis Ruth Kevess-Cohen kun titolo ‘Kial Burno?’:

https://uea.facila.org/artikoloj/lingvo/kial-burno-r473/

========= vortoj: 760, =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Dek tri numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.